

bulgara esperantisto

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Rekomendita de la M-rio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II. 1938

JARO XXII

SOFIA

JANUARO KAJ FEBRUARO, 1941

1-2

La tri premisoj de nia sukceso

La sociaj kaj kulturaj kondiĉoj de-
post kelkaj jardekoj rapide evoluis. La
politika situacio de la ŝtatoj kaj popo-
loj necesigas novajn metodojn en la por-
esperanta agado. Tio, kio hieraŭ estis
efika metodo, hodiaŭ fariĝis ana-
kronismo. La vivo montras al ni ĉiutage
pitoreskajn ekzemplojn pri sukceso aŭ
pereo, pri triumfo aŭ disfalo de poten-
caj kulturaj, religiaj, sociaj kaj politi-
kaj movadoj. Tiuj ĉi ekzemploj bone
nin instruu pri la vojoj, kiujn ni devas
sekvi, kaj pri la metodoj, kiujn ni devas
utiligi en la nunaj malfacilaj tempoj.

La samaj leĝoj kaj principoj, kiuj
reguligas la kreskadon de la organis-
moj en la vivanta nat ro, rĕgas ankaŭ
la vivon de la sociaj kaj kulturaj entre-
prenoj aŭ movadoj: nur la fortaj, volo-
plenaj, bone adaptitaj kaj dinamikaj or-
ganismoj havas rajton prosperi, kreski,
batali kaj venki en la lukto por ekzi-
stado. Baldaŭ sur la tero ne plu estos
loko por molspiritaj, facilanimaj kaj
mallaboremaj estaĵoj. Ideaj movadoj,
kiuj ne povos tuj adaptiĝi al la nova
pulso de la cirkonstancoj, estos kondam-
nitaj je pereo, kaj iliaj membroj estos
ekstermitaj, se ili ne organiziĝos en
kompakta, disciplinita kaj dinamika
maso.

La prospero de la esperanto-movado
estas problemo de organizo. Nek mono,
nek politika povo, nek oficiala rekono

de iu interŝtata aŭ internacia konfe-
renco estas necesa por nia venko. La
triumfo de nia „afero“ dependas de tri
absolutaj premisoj: **disciplino, laborado**
kaj **taktiko**. Tiuj ĉi tri postuloj estas la
necesa kaj sufiĉa kondiĉo por efika
agado en la kampo de la esperantista
vivo. Per la disciplino ni realigos ordon,
harmonion kaj unuecon en niaj rangoj
kaj ŝparos niajn fortojn. Dank' al ĝi
neniu peno, neniu klopodo de aparta
esperantisto estos perdita; ĝi ebligos la
unuigon de ĉiuj niaj fortoj kaj la utiligon
de ĉies niaj mensoj.

La laborado estas dua premiso
de nia triumfo. Ni ne esperu „reunuiĝi
la homojn“ kaj realigi niajn plej altajn
idealajn per krucitaj brakoj aŭ per
dolĉa revado. Nenio estas pli danĝera
por la ideaj kultursociaj movadoj ol
la pasiva idealemo kaj vana filozofado.
La laboro havigos al ni ĉion, kion ni be-
zonas por nia fina celo; krome, ĝi for-
tikigos niajn mensojn kaj adaptos nian
agadon al la specifika kondiĉoj de la
medio.

Sendube, tiu ĉi laboro devas fondiĝi
sur saĝa taktiko – tria premiso de nia
sukceso. Ĉiu ago poresperanta, ĉiu en-
trepreno aŭ faro devas esti longe pri-
pensita kaj detale preparita. Se ni
agas senpripense kaj hazarde, ni riskas
kaŭzi gravegajn malutilojn al la espe-
ranto-movado.

Armitaj per tiuj ĉi tri potencaj bataliloj — disciplino, laborado kaj taktiko—ni povas kuraĝe ekpaŝi al nia celo.

La nuntempaj perturboj ne devas iel ajn nin malesperigi. La ideoj kaj kultursociaj movadoj, se ili estas majstre organizitaj kaj saĝe gvidataj, postvi-

vas eĉ la plej terurajn katastrofojn. Nia movado postvivos la militon, kiel la kristanismo postvis la disfalon de la Roma imperio. Tamen, ni lernu labori eĉ en plej malfacilaj cirkonstancoj, kun plena konscio de nia kultursocia misio.
D-ro St. Ĝuĝev.

TRIBUNO DE LA PIONIROJ

Grava problemo de nia movado

Estas necese rigardi tra pli larĝa perspektivo la hodiaŭ disvolviĝantajn okazintaĵojn. Vere, la nunaj eblecoj por internacia kunlaborado estas tute limigitaj. Tamen, ni devas vivi kun la kredo ke la tempesto forpasos, kiel jam multaj similaj al ĝi forpasis. Tiam nova ondo de ekonomia, soci-politika kaj kultura kreado inundos la mondon. La aspiro por internacia kunlaborado denove ekkaptos ĉiujn popolojn el la tuta terglobo. Tiam ankaŭ ni, esperantistoj, devos alporti niajn modestajn klopodojn por la ĝenerala restarigo de la homaro. Ĉu ni estos pretaj renkonti tiun ĉi momenton?

En la rondoj esperantistaj de Jugoslavio tiu ĉi demando jam delonge okupis gravan lokon en la tagordo de la movado. Tio ĉi estis kaŭzita de la granda zorgemo de la tiea sociopinio pri la vojo, kiun oni devas sekvi en la instruado, al la juna generacio, de fremdaj lingvoj, necesaj por la interrilatado kun fremdlando. La jugoslava sociopinio konvinkigis, ke la enkonduko kaj instruado de la lingvoj de grandaj nacioj en la mezlernejoj estas tute senrezulta kaj senutila. Ĉar, unuflanke, la instruado en la gimnazioj ne sukcesas liveri eblecon eĉ por la plej elementa utiligo de la lernata lingvo kaj, aliflanke,

la potenco de la diversaj grandaj nacioj ŝanĝiĝas tiel rapide, ke la signifo de iliaj lingvoj fariĝis tute nekonstanta.

Do, ne la jugoslaviaj esperantistoj, sed la jugoslavia sociopinio mem, en vico de komuncivitanaj kaj gepatro-instruistaj kunvenoj, aŭ per la gazetaro, faris proponon

por la enkonduko de Esperanto kiel deviga lernobjekto en ĉiujn lernejojn de la lando.

Sed jen, denove stariĝas la demando: ĉu la jugoslaviaj esperantistoj estas pretaj plenumi similan decidon? Kaj la eminenta prezidanto de la Jugoslavia Esperanto Ligo, D-ro Ivo Lapena, respondas: ne! ili ne estas pretaj! Ĉar mankas instruantoj de Esperanto!

En Bulgarujo la afero ne estas tro malsama ol la situacio en Jugoslavio. Neniu pravus miri, se ankaŭ la bulgara sociopinio konvinkigis, ke la sensukcesa kaj senutila instruado de fremdaj lingvoj devas esti anstataŭita per la instruado de Esperanto; ke Esperanto devas esti enkondukita en ĉiujn popolajn kaj mezajn lernejojn de la ŝtato. Tiurilate, signifoplenaj estis la vortoj de la regionestro de Loveĉ. Salutante, kiel reprezentanto de la registaro, nian lastan landan kongreson, li atentigis ĝuste tiun ĉi vidpunkton. Kaj se nia registaro prenis la ĵeleĝe decidon enkonduki Esperanton en la lernejojn — ĝi surprizos nin tute nepreparitaj. Ĉar ni, samkiel la jugoslaviaj esperantistoj, havas tute nesufiĉan nombron da instruantoj kun solida prepariteco. Ni ne havas eĉ tiom da Esperantolektoroj, kiom estas necesaj por malfermi kursojn ĉiuloke, kie dezirantoj por lerni la lingvon aperos en sufiĉa kvanto. Jen pro kio

ni debes streĉi ĉiujn niajn fortojn por preparado de bonaj instruantoj de Esperanto.

Ĉiu iom progresinta esperantisto devas havi la ambicion ekposedi la

lingvon ĝis tia grado, ke li povu ĝin instrui al aliaj personoj. Ne ĉiuj esperantistoj povos nun apliki en la praktiko sian kapablecon. Multaj el ni devos konservi neutiligitan sian energion ĝis la momento, kiam kreiĝos favoraj cirkon-

stancoj por ekagi. Bone konsciante la bezonojn de nia movado, kun kredo en la estonto, ni ĉiel klopodu por krei la favorajn cirkonstancojn.

Vili Rozev

ZAMEHOFA TEKSTO

Pri la Esperanta stilo

Kelkaj esperantistoj pensas, ke mi uzas en miaj verkoj stilon slavan. Tia opinio estas tute erara. Estas vero, ke slavoj ofte posedas en Esperanto pli bonan stilon, ol germanoj aŭ romanoj; sed tio ĉi venas ne de tio, ke la stilo en Esperanto estas slava, sed nur de tio, ke la slavaj lingvoj havas vortordon pli simplan kaj sekve ankaŭ pli proksiman al la vortordo en Esperanto. La vera stilo Esperanta estas nek slava, nek germana, nek romana, ĝi estas — aŭ almenaŭ devas esti — nur stilo simpla kaj logika.

Tamen ĉio devas esti en ĝusta mezuro. Ankaŭ en Esperanto troviĝas diversaj (ne multaj) idiotismoj, kaj tute malprave kelkaj esperantistoj ilin kontraŭbatalas, ĉar lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo senviva kaj tro peza; sed kvankam kelkaj el la esperantaj idiotismoj estas prenitaj ankaŭ el la lingvoj slavaj (dum aliaj estas prenitaj el aliaj lingvoj), ili tamen estas ne slavismoj, sed esperantismoj, ĉar ili fariĝis parto de la lingvo.

La stilo Esperanta ne imitas blinde la stilojn de aliaj lingvoj, sed havas sian karakteron tute specialan kaj memstaran, kiu ellaboriĝis en la daŭro de longa praktika uzado de la lingvo kaj pensado en tiu ĉi lingvo antaŭ ol la lingvo estis publikigita. Se iu slavo ne havas ankoraŭ sufiĉe da sperto en la lingvo kaj volos traduki en Esperanton laŭvorte el sia nacia lingvo, lia stilo estos tiel same malbona kaj sensenca, kiel la Esperanta stilo de nesperta romano aŭ germano. Por ekzemplo mi citos al vi pecon de unu el tiuj leteroj, kiujn mi ofte ricevas de rusoj, kiam ili ellernis la gramatikon

kaj vortojn de Esperanto, sed ne konas ankoraŭ ĝian stilon kaj tradukas laŭvorte el sia nacia lingvo. Komparu kun la stilo Esperanta, kaj tiam vi tuj vidus, kiel erara estas la opinio de kelkaj personoj pri la „slaveco“ de la Esperanta stilo:

„Favora Regnestro! Honoro havas alkuŝigi, kio laŭ kaŭzo de antaŭskribita al mi kun kuracisto kuraco mi en efektiva tempo ne en stato elpleni de donita kun mi al vi promeso; apud kio postaperigas, ke mi turnos sin al domo tra du monatoj, ne pli frue de fino de Aŭgusto“.

Tiu ĉi sama peco en stilo Esperanta sonus tiamaniere:

„Estimata sinjoro! Mi havas la honoron raporti al vi, ke kaŭze de kuracado, rekomendita al mi de la kuracisto, mi en la nuna tempo ne povas plenumi la promeson, kiun mi donis al vi; mi ankaŭ sciigas vin, ke mi revenos hejmen post du monatoj, ne pli frue ol en la fino de Aŭgusto“.

La Revuo, 1906, Decembro

ПОДЪ ПЕЧАТЪ

ЗАМЕНХОФЪ

идеи и творчество

отъ ЕРНЕСТЪ ДРЕЗЕНЪ

КНИГАТА е сериозна студия върху творчеството и идейното оформяване на *Заменховъ*. Да опознаемъ дѣлото на нашия учителъ — първия есперантистъ!

Струва 12 лева, но въ предплата до 12 априлъ — 8 лв. въ герб. или пощенски марки.

АДРЕСЪ: Василь Чочовъ, ул. „Люлинъ“ 38 — София.

ELEKTITAJ PAĜOJ EL LA BULGARA LITERATURO

ELIN PELIN

POEMOJ EN PROZO**Rigardoj**

Se mi estus poeto, mi verkus multajn versaĵojn. Mi prikantus nek la ĉielon, nek la kamparon, nek la printempon, nek la aŭtunon. Mi pentrus neniam bildojn de la mateno kaj de la vespero, de la arbaroj kaj de la montoj. Sed mi skribus etajn, belajn, gajajn kantojn, senzorgajn, naivajn, eĉ stultajn — mi skribus kantojn pri la juneco, pri la plej bela eco, kiun oni havas kaj perdas dum la vivo.

Tiujn ĉi versaĵojn mi eldonus en malgranda, bela libreto, bindita en blanka felo, kaj mi nomus ĝin „Rigardoj“, dediĉe al la okuloj, kiuj neniam mensogas kaj en kies lazuro ni vidas unu la alian; dediĉe al la rigardoj interŝanĝitaj ofte — hazarde aŭ intence — kun juna knabino.

Alaŭdo

En la arbaro, en la vojoj kaj en la kamparo estis multaj homoj. Ĉiuj parolis pri sia malfeliĉo kaj ĉiuj estis malkontentaj unuj de la aliaj.

Ilin aŭdis eta alaŭdo kaj ĉagreniĝis.

Tian grandan vastaĵon, tiajn arbarojn, kampojn kaj marojn vidis la alaŭdo — kaj ĉie homojn, kaj nur ili estis malfeliĉaj.

Iun matenon ĝi ekflugis kaj kantante ekŝvebis al la ĉielo.

Feliĉa alaŭdo.

Ĝi intencis flugi al Dio, por kanti al Li kaj peti feliĉon por la homaro. Ĝi estis preta oferi sian tutan liberecon, se Dio donus unu eron de Sia trankvileco al la homoj. Por ili tio estus eĉ multo.

Tiu ĉi malgranda alaŭdo, sin forge-sinte en sia granda ideo alporti feliĉon al la homoj, sentis nenian lacecon kaj ĉiam flugis pli alten kaj kantis.

Ĝi kantis el sia tuta milda koro, ĝi elverŝis sian tutan varman animon.

Kaj ju pli alten ĝi leviĝis, des pli alta fariĝis la ĉielo.

Sed la alaŭdo ne malesperis.

Pli alten ĝi flugis kaj pli sinforge-se kantis.

Kaj krevis la kantema koreto de la bona birdo. Malstreĉiĝis ĝiaj viglajflugiletoj. Strio de sango ruĝigis ĝian beketon.

Ĝi falis morta sur la kampon.

Kaj neniu aŭdis ĝian kanton. Nek la feliĉa Dio sur la ĉielo, nek la suferantaj homoj sur la tero.

Krizantemoj

La strato de la urbo estas plena je matena aŭtuna nebulo, malpeza kiel fumo. La konturoj de la domoj, homoj, veturiloj kaj aŭtomobiloj, kiuj rapide aperas kaj malaperas, estas preskaŭ kaŝitaj. Malproksime, kvazaŭ en ŝvitiĝinta spe-gulo, mi vidas moviĝi ian malklaran reton de koloroj. Ĝi malrapide, malrapide prok-simiĝas. Kaduka, ĉifonvestita portisto, kovrita per griza malpeza jaketo, portas grandan faskon da krizantemoj — blankaj, flavaj, helruĝaj, sangruĝaj, malhelkoloraj. Li pene premas ilin, kaj tiuj molaj, mildaj floroj, belaj kaj vivaj, kovras la tutan gri-ziĝintan kapon de la maljunulo. Malantaŭ ili apenaŭ rigardas la enpena, mizera vi-zaĝo, ŝveliĝinta pro frostoj.

Tiun ĉi maljunulon sekvas sinjorino dronanta en funebro. La nigra vualo kovras ŝin entute kaj oni ne povas vidi ĉu ŝi estas juna aŭ maljuna, bela aŭ malbela. Tie ĉi la strato estas senhoma kaj ili marŝas en ĝia mezo — la portisto antaŭe kaj kelkajn paŝojn post il — la sinjorino. La nebulo forviŝas la materiajn formojn de la portisto, sed la nigra fuguro de la virino klare vidiĝas. La multkoloraj pompaj floroj de la krizantemoj gaje tre-metas pro la skua irado de la maljunulo kaj ludas super lia kapo. Unuj kliniĝas forte, aliaj stariĝas, tremetas, saltetas, sin turnas kune al la fnnebra virino kaj de-nove rigardas la vojon antaŭ si.

Ho mildaj, belaj krizantemoj, belaj kreaĵoj de la matura aŭtuno, vin oni por-

tas sur la tombejon, vi putriĝos sur la freŝa humo de iu tombo, vi, tiom belaj, destinitaj por ama donaco, ne floras dum printempo, kiam la amo floras.

Via patrino, la aŭtuno, naskas vin, dum sur la tero estas tia malĝojo.

Forgesita kanto

Mi sciis kanton.

Eble pasis multe da tempo de tiam, jam en mia infanaĝo, ĉar mi memoras nek la melodion, nek la vortojn. Mia koro fandiĝas ĉe la rememoro kaj sopiras ekkanti kaj pleniĝi denove per tiu dolĉa printempa melodio kaj tiuj misterplenaj vortoj de mia kanto; sed ĝi ne povas.

Kaj ĉiufoje, kiam mi eliras en la kampon, kaj vidas la rigardon de la hontemaj violoj, mi aŭdas super mia kapo la kanton de l'alaŭdo, eksentas la treŝan kareson de la vento, kiu petolas tra la verdaj folioj aŭ dancas sur la valoj kiel knabino; kiam mi ekvidas kliniĝintajn sur la nigraj sulkoj super la plugilo, la malriĉajn infanojn de la patrino-tero kaj tiun senfinan pejzaĝon de vilaĝetoj, vojoj kaj riveroj, lumigitaj de ĉielrideto — tiam en mian animon verŝiĝas ondo de tia dolĉa doloro, de tiu soleno kaj espero, per kiuj plenigadis min iam mia kanteto, mia forgesita kanteto!

Aŭtune, kiam pezaj nebuloj ekkuŝas sur la firmamento, kiam fajraj kaj oraj vundoj kolorigas la arbojn, kiam la birdoj forflugas, kiam la floroj mortas kaj la herboj malsaniĝas, kiel suferas mi por mia forgesita kanto!

Kia ĝi estis? Ĉu ĝi rakontis pri mia infaneco? Ĝi priskribis mian vilaĝeton? Aŭ ĝi estis la kanto de la rapidekuranta rivereto, apud kiu mi ludadis? Aŭ tio ja ne estis kanto, sed nur tiel ŝajnis al mi? Eble tio estis la malgranda kamaradino de miaj infanaj ludoj, kiu nun pace ripozas en sia tombeto! Eble tio estas la milda patrino kareso, la varma patrino larmero.

Ĉu vi efektive ekzistis, ĉu mi efektive kantis vin, ho mia malgranda kanto, sekreta kaj melodica — aŭ tio estis nur la feliĉaj songoj de revema kaj malsana infano?

Mi emas plori por vi, mia forgesita kanto!

Ĉu iam mi rememoros viajn vortojn, ĉu iam mi aŭdos denove vian mildan melodion?

Kiam, lacigita de la vivo, mi kuŝos en la malvarma tombo por ripozi, liberigite de miloj da antaŭjuĝoj, kiuj faras la vivon malfacila, de miloj da kondiĉoj, kiuj faras ĝin vanta, kiam super mi verdos herbeto kaj ekfloros memkreskinta sovaĝa rozujo, kiam mi forgesos ĉion kaj mia penso ĉesos serĉi la veron kaj maltrankviliĝi de la iluzio pri bono kaj malbono — tiam, en tiu tombsilento, kredeble mi aŭdos vin, mia dolĉa forgesita kanto, kaj sub via kvietaj melodio kaj sub viaj misteraj kaj karaj vortoj mi dormos, kviete mi dormos kiel en patrino sino.

Sorto

Kia estas la ĝusta senco de tiu ĉi vorto? Kial la homoj elparolas ĝin tiel forte, tiel krie, ĉiam, kiam ĝi eksonas en iliaj buŝoj? Kial ĉiuj tiel multsignife ĝin substrekas?

Kio ĝi estas? Mi ne scias.

Neniu scias.

Kaj kiom kaprica ĝi estas! Kiel ĝi tromplogas, kiel mokas nin!

Ĝi plenigas vian koron je kredo kaj espero, aperigas antaŭ viaj okuloj la ravan fantomon de la feliĉo, kaj, kunliginte perfide viajn piedojn per la ŝnuro de naŭdek-naŭ maleblaĵoj, diras al vi esperdone: — Tenu! . . .

En via sensaĝa aspiro vi vin ĵetas kun etenditaj brakoj post la alloga fantomo, sed tuj kiam vi estas kaptonta ĝin vi renversiĝas kaj . . . hop — falas kun la kapo antaŭen.

Komenciĝas kapturnaj faladoj kaj kurodoj post la tenta fantomo. Dume la sorto staras ĉe via flanko, rigardas kaj mokas vin.

Elin Pelin (pseŭdonoimo de Dimitar Ivanov) tre ŝatata bulgara beletristika verkisto, naskiĝis en vilaĝo Bajlovo, Sofia regiono, en la jaro 1878. Sian literaturan edukon li akiris per aŭtodidakta laboro. Li laboris unue kiel instruisto en sia naskiĝa vilaĝo, poste kiel oficisto en la nacia biblioteko kaj kiel konservanto en la nacia muzeo „Ivan Vazov“. Elin Pelin pentras plej ofte la primitivan vivon, la drinkemon kaj la mizeron de la bulgara vilaĝano. Lia humoro kaj precipe lia ĝusta observemo vekas ĉe la leganto kom-

paton por la malriĉaj, malkleraj kaj eraremaj homoj. Liaj plej konataj rakontoj estas: Lepo, Vidvo, Krime, Spasova monteto, La familio Gerak (tradukita en Esperanton), Feino, Sur la sulko, Gasto, k. a. En 1921 li redaktis (kune kun Aleks. Balabanov) la literaturan ĵurnalon Razvigor. Elin Pelin

publikigis la kolektojn: Rakontoj, I. vol. (1905), Cindro el miaj cigaredoj (1905), Rakontoj, II. vol. (1911), Bukedo por la heroo (1917), Piĵo kaj Pendo (humorajo, 1918), Nigraj rozoj (poemoj en prozo, 1928), Tero (novelo, 1928), k. a.

HR. JASENOV

EL „FABELA REGNO“

Oraŭtuno orfoliojn ŝutas,
branĉojn kovras sunpurpura kron'.
En ĉagreno horizontoj mutas,
ruiniĝas mia brila tron'.
Pluvo tra nebulo susuretas,
en solec' konsumas sin anim'.
Mi mortlaca pro frakaso estas —
— Panjo kara, ĉi vi aŭdas min?

Ombrojn grizajn sternas nokt' senluna,
nebuligas kampojn en ripoz'.
Mi forgesis vervojn brilelumajn,
fulmflugiloj brulas en kaos'.
Kaj perdinte vojon kaj vivcelon
en izolo senhejmeca, mi
estingiĝas mute en malhelo. . .
— Panjo kara, ĉu min aŭdas vi?

Tra betuloj blankaj fajfas vento,
foliaron ŝiras sen esper';
branĉoj nudaj ĝemas en silento,
mev' timema ploras sur la ter'.
Sub vualo de abismo faŭka
dormas ĉio en izol' sen fin'. . .
En mi ploras, petas voĉo raŭka. . .
— Panjo kara, ĉu vi aŭdas ĝin?

Tradukis: *Vili Rozev*



STOJAN OMARČEVSKI
(1885—1941)

La 10-an de marto 1941 mortis la bulgara parlamentano kaj eksministro Stojan Omarčevski. Naskita dum la jaro 1885 en Nova Zagora, li studis en la gimnazio de Stara Zagora, poste en la filologia kaj en la jura fakultato de la Ŝtata Universitato. Omarčevski partoprenis aktive la socialan movadon de la bulgaraj terkulturistoj. Liaj meritoj al la bulgara nacia kulturo estas grandaj. Liaj kreaĵoj estas: la Ŝtata pentrarta akademio, la Ŝtata muzikakademio, la Agronoma fakultato, la Arbarscienca fakultato, la Nacia opereatro k. a. Kiel ministro de la popola klerigo (21. V. 1921 — 9. VI. 1923) Stojan Omarčevski enkondukis Esperanton kiel nedevigan lernobjekton en la bulgarajn mezlernejojn.

NENĈO ILIEV—SIRIUS.

Neprofitemaj servistoj

(El la kolekto „Feliciaj tempoj“)

Tiaj inter la homoj jam estas maloftaĵo. Neprofitemaj servistoj plej ofte povas troviĝi inter la ĉevaloj. Kaj se la homoj imitus ilin, la mondo estus akirinta tute alian aspekton.

Neprofitema servisto estis la ĉevalo Brannik. Veninta el Ruslando por nin liberigi, Brannik vive partoprenis kun la artilerio la sieĝadon kaj konkeron de Pleven, kie ĝi distingiĝis per rimarkindaj heroaĵoj.

Ĉar la rusoj ne havis, kiel la germanoj, „Feldpost“, nek fervore kiel ili faris „auspumpen“ de vivaj popolaj suktoj, ili anstataŭ elporti ion el Bulgarujo, enportis, donacinte al ni armilojn, municiojn kaj ĉevalojn. En la nombron de tiuj ĉevaloj eniris ankaŭ Brannik. Pli malfrue tiu veterano partoprenis kun la bulgara artilerio la militon de 1885 kontraŭ la serboj, kie ĝi ankaŭ montris rimarkindajn militajn virtojn, kaj post tio restis por pactempa servo en la 9-a artileria regimento.

Kaim Brannik tute maljuniĝis ĝi estis eksigita kaj, ne postulante rekompenco, pension aŭ kian ajn helpon pro siaj meritoj, ĝi restis loĝi en la kazerno.

Kaj matene, kiam la ĉevaloj estis jungataj en la kanonoj por ekzercado, Brannik memvole eliris kaj viciĝis mem ĉe la dekstra flanko de l' unua kanono por esti jungita, sed anstataŭ ĝin oni enjungis junan kaj fortan ĉevalon. La okuloj de Brannik pleniĝis je larmoj kaj ĝi ĉagrene mallevis sian maljunan kapon, super kiu estis fajfegintaj tiom da grenadoj kaj kugloj.

Kiam la baterio komencis la ekzercadon, Brannik viciĝis apud la timona ĉevalo, kiu okupis ĝian lokon dekstren, kuris kaj, laŭ la komando „reveno maldekstren“ aŭ „reveno dekstren“, ĝi turnis sin antaŭ ol la aliaj, kiuj ĉiam, por sin turni, atendis la pikon de la spronoj.

Sed ne estas nur Brannik, kiu distingiĝis per tia servofervoro. Similan ekzemplon donas al ni ankaŭ du aliaj ĉevaloj, kiuj estis ne en milita, sed en civila servo.

Bando da rabistoj estis atakinta la poŝtveturilon inter la urboj Dupnica kaj Gorna

Ĝumaja. La rabistoj embuske ekpafegis kontraŭ la du policanoj kaj la ceteraj du estis grave vunditaj. Sed kiam la rabistoj provis haltigi la ĉevalojn kaj rabi la valoraĵojn, kiuj sumiĝis je kelkcentmiloj da frankoj — la ĉevaloj ekkuregis kiel drakoj al Gorna-Ĝumaja. En la malluma nokto, ne estante kondukataj de iu ajn kaj ne disponante topografian karton, la ĉevaloj manifestaciis pli solidajn geografiajn konojn ol certaj ĉefstabaj oficiroj dum la Balkana milito, kvankam ili estis provizitaj per kartoj!

Kaj efektive, tiuj bulgaraj ĉevaloj sukcesis alveturigi la poŝton netuŝita en Gorna Ĝumaja, kie ili ĝin transdonis, kune kun ĉiuj ĝiaj valoraĵoj, al la regionestro. Ili bonege faris heroaĵon, kiu ne estis en la kadro de iliaj devoj, dum tuj post tio la vokita kuracisto-specialisto rifuzis en malfrua horo aperi por doni unuan medicinan helpon al la grave vunditaj.

Do la kuracisto rifuzis plenumi sian bone pagatan oficon, tial fariĝis necese lin devigi plenumi sian devon.

En la okazo la ĉevaloj manifestis tri grandajn virtojn, kiaj tiel malofte renkontiĝas nun en nia bela lando: — ili savis la grave vunditajn, montris altan inteligentecon kaj la plej grava — ili distingiĝis per rimarkinda malprofitemo.

Kaj vere, se en tiu poŝtveturilo, anstataŭ la ĉevaloj, estis jungitaj du kuracistoj kiel tiu en Gorna-Ĝumaja, aŭ kiel tiuj, kiuj dum la milito kuracis la ĥolerajn soldatojn per binokloj, nedisputeble ili jam en la komenco mem estus renversintaj la veturilon kaj forlasintaj al la sorto la grave vunditajn. Se estus enjungitaj du bulgaraj diplomatoj de la speco de tiuj, kiuj gvidis la sortojn de Bulgarujo dum la militoj, ili, anstataŭ alkonduki la veturilon kun la valoraĵoj en Gorna-Ĝumaja, estus certe erarintaj la vojon kaj forkondukintaj ilin en grekan teritorion; alidirite, post kiam ili savos la valoraĵojn de la rabemaj manoj de

rabistoj, ili transdonus tiujn valoraĵojn en la manojn de aliaj — ankoraŭ pli grandaj. . .

Sed ne estas solaj tiuj bulgaraj ĉevaloj, kiuj povas fieriĝi pro alta nobleco kaj admirinda malprofitemo. La bulgaraj ĉevaloj ĉie kaj ĉiam, kiel en milita, tiel ankaŭ en paca tempo, distingiĝas per tia moralo kaj tia sindono, antaŭ kiuj la bulgaraj ŝtatservistoj devus bonvole depreni la ĉapelon.

Kaj efektive, niaj ĉevaloj dum la milito nenie neniun prirabis, ne prenis subaĉetojn, ne kunportis trofeojn: ĉie ili servis neprofiteme kaj kun fiera konscio pri plenumo de sia sankta devo al la tero, kiu ilin naskis. Ĉiam sur sia posteno, ili ĉiam estis kuraĝaj kaj neniu el ili forkuris de l'batallinio. Kiel ĉe la fronto sub la teruraj grenadotondroj, tiel ankaŭ ĉe la postfronto, sub pluvo kaj neĝo, ili digne servis la patrujon.

Se la ĉevaloj superas nin, tio estas, verŝajne, ĉar ili apartenas al neniu politika partio. Kaj ĉar ili ne legas gazetojn, ili restis malproksime de ĉiu homa korupto.


Kaj vere, kun aparta ĝojo oni devas noti, ke depost kiam Bulgarujo posedas la novajn teritoriojn, la unua neprofitema socia faro, kiu superas ĉiun laŭdon kaj meritas rekompencon, estas la faro de tiuj ĉevaloj.

Ilian meriton, ni estas certaj, ĉiu juste taksos, se li nur demandos sin:

Kio okazus kun la valoraĵoj, se en la poŝtveturilo, anastataŭ tiuj neprofitemaj ĉevaloj, estus jungitaj du sekretarioj— impostistoj? . .

Kun permeso de l'aŭtoro,
trad. el la bulgara:

Ivan H. Krestanov, L. K.



Hristo Stanĉev

Antaŭ la ventego

La perdita kamelo

(Orienta rakonto)

Unu derviŝo iris sola tra la dezerto. Tie li renkontis du komercistojn.

„Vi perdis vian kamelon“, diris li al la komercistoj.

„Jes, prave, ni perdis ĝin“, ili respondis.

„Ĉu ĝi ne estis blinda je sia dekstra okulo kaj lama je sia maldekstra piedo?“ demandis la derviŝo.

„Jes, ĝuste!“ respondis la komercistoj.

„Ĉu ĝi ne estis sen unu antaŭa dento?“ demandis la derviŝo.

„Jes“, diris la komercistoj.

„Kaj ĉu ĝi ne estis ŝarĝita per mielo unuflanke kaj per maizo aliflanke?“

„Ĝuste kiel vi diras!“ respondis la komercistoj. „Kaj ĉar vi vidis ĝin antaŭ nelongatempe, vi ja povas nin gvidi al ĝi.“

„Miaj amikoj“, diris la derviŝo, „mi neniam vidis vian kamelon, nek aŭdis iun alian krom vi mem paroli pri ĝi.“

„Stranga afero vere!“ kriis la komercistoj. „Vi nepre vidis ĝin. Kaj kie estas la juveloj, el kiuj konsistis la alia parto de la ŝarĝo?“

„Mi neniam vidis vian kamelon, nek viajn juvelojn!“ ripetadis la derviŝo.

Tamen ili kaptis lin kaj kondukis lin al la juĝisto, por esti juĝata. Sed eĉ la plej zorga kaj severa ekzameno estis

senrezulta. Nenio pruvis, ke li estas kulpa nek pro mensogo, nek pro ŝtelo.

„Li estas sorĉisto“ kriis la komercistoj. Sed la derviŝo trankvile diris al la juĝisto:

„Mi vidas, ke vi estas surprizita kaj vi opinias ke mi vin trompas. Verŝajne mi mem donis al vi la kaŭzon de tia opinio. Mi longe vivis sola, sed mi lernis observi kaj pensi, eĉ en la dezerto. Mi eksciis, ke la kamelo, kies postsignojn mi renkontis sur la sablo, estis perdita de ĝia posedanto, ĉar mi vidis nur ĝiajn piedsignojn, sed mi ne trovis postsignojn de homa piedo. Mi konkludis, ke la kamelo estis blinda je sia dekstra okulo, ĉar mi rimarkis, ke ĝi paŝtis la herbon nur sur la maldekstra flanko de la vojo. Kaj mi vidis, ke ĝi lamis je sia maldekstra piedo, ĉar tiu ĉi piedo presis malpli profundan postsignon sur la sablo. Poste mi konkludis, ke unu dento mankis al la besto, ĉar mi rimarkis, ke tie, kie ĝi paŝtis, ĉiam unu malgranda bukedeto da herbo restis nemordtranĉita. Mi divenis per kio ĝi estis ŝarĝita laŭ la laboremaj formikoj kiuj ŝatas la maizon kaj laŭ la svarmantaj muŝoj kiuj atakas la mielon.“

Genève, 26. VIII. 1930.

Esperantigis St. Ĝ.

ORIGINALAJ VERKOJ EN ESPERANTO

Printempa rivero

Brusto printempa de sukaj streĉita
drakon brilskvaman mamnutris en mont',
kaj ĝi, ŝprucante fajrerojn, subite
ĵetis sin ŝvela malsupren de l'font'.

Kuras la drako — bruanta rivero,
ondoj ribelas kaj saltas el bord',
urĝas kapturte, subfosas kolere
arbojn, kaj ŝtonojn muelas kun fort'.

Flava kaj kota kaj forto-ebria
tondras venk-himnon ĝi, plaŭdas sen ĉes',

kvazaŭ ne ondoj, sed monstroj furiaj
luktas kaj muĝas en sia frenez'.

Tage kaj nokte altiĝas akvaroj,
strioj sin saltas, surrajdas en kur'.
Kota ŝaŭm' dancas sur turnoj malklaraj,
dronas, tirata al fund', kun murmur'.

La inunditaj salikoj sin skuas
kvazaŭ dronintoj celantaj al ter'.
Ruĝaj branĉetoj elstaras el fluoj —
fingroj petantaj en morta danĝer'.

Ridas timige river' malserena,
bordojn subfosas kaj kuras sen star',
muĝas kaj tondras kaj ŝtipojn surtrenas,
ŝlimon kaj ŝaŭmon forportas al mar'.

Eta, senpova sur bordo mi kaŭras,
miras kun tim' mia homa mizer':
mi eĉ jarcento-duonon ne daŭros —
fluos jarmilojn ĉi tiu river'!

D. Z. Miti.



Ivan Hristov

La monahejo de Trojan

MERITAJ VETERANOJ

Georgi P. Oreškov

Georgi P. Oreškov estas naskita en urbo Koprivštica. En 1899 j. li, kune kun samideano Hristo Popov, eldonis lernolibron kun titolo: „Plena manokondiko por el-lerno de lingvo internacia Esperanto“. Antaŭ tiu dato li fondis, kun kelkaj samideanoj, la klubon „Stelo“, kiu estas la unua esperantista organizaĵo en Bulgarujo. Je la komenco de 1903 j. li, kune kun G. Atanasov, malfermis kurson por instruado de Esperanto. En la mezo de 1902 j. li kaj G. Atanasov fondis la revuon „Rondiranto“, kies redaktoroj fariĝis ili ambaŭ. G. Oreškov estis samtempe administranto de la revuo kaj konstanta sekretario de la klubo „Stelo“. Je la fino de 1903 j. li ricevis de la Franca espe-

rantista societo „ateston pri kapableco“ por la lingvo internacia Esperanto. En la sama tempo li kun Ĥr. Popov kaj aliaj samideanoj havis la iniciativon fondi en Sofia la Bulgaran societon por propagando de Esperanto. Krome, li kaj G. Atanasov partoprenis la tradukadon de la Universala Vortaro de D-ro Zamenhov kaj la preparon de la dua eldono de „Esperanto en 10 lecionoj“.

G. Oreškov estas unu el tiuj malnovaj pioniroj, kiuj semis la unuajn grajnoj de la nuna Esperanto — movado en Bulgarujo. La juna generacio de la bulgaraj esperantistoj ŝuldas al li dankon kaj respekton.

Ni bondeziras al li longan vivon, por ke li vidu la fruktojn de siaj noblaj klopodoj.
Georgi Atanasov

TURISMO

Vizitinda lando

La 103,106 kvadrataj kilometraj de Bulgarujo entenas grandan variecon de la supraĵo — fakto tre favora por la disvastiĝo de turismo.

Ekirinte de la spegula vasto de maro, travaginte la larĝajn ebenaĵojn ondumitajn per malgrandaj montetoj, vi atingas la ĉeĉielan altaĵon de la montoj. — La varieco ne estas nur topografia. Ekzistas fenomenoj, kies interesa naturo allogas multajn pilgrimantojn. Tiaj estas: la dezerto ĉe Gebeĝe kun siaj enĉizitaj ŝtonoj starantaj kiel figuroj; la grandaj karstaj fontoj ĉe Devnja kaj Lukovit, la subakvumita arbaro de Longozo; la „Fungoj“ ĉe Petriĉ,

la Piramidoj ĉe Kâtina, la grotoj ĉe Lakatnik, Vraca, Ĉerven Breg, Ruĵinci k. a. la akvofalo „Ŝprucilo“ en Stara-Planina, k. a.

Bulgarujo kuŝas en moderklimata regiono kaj havas kontinentan klimaton, kiu ebligas praktikadon de la turismo al granda nombro da homoj, kiuj, precipe somere, vivigas la montojn.

Kvankam ne tipe montara lando (la kampoj okupas 39,381 kv. klm.) Bulgarujo, dank' al sia virga naturo, dum longa tempo ankoraŭ prezentos intereson por tiuj, kiuj ŝatas la naturbelaĵojn, netuŝitajn de homa mano.

NIA VIVO

— **Sofia.** La societo aranĝas ĉiunmerkredon kunveno kun „ĵurnalo parolata“, kiu havas interesan kaj varian materialon. Ĝin partoprenas multaj samideanoj, precipe studentoj kaj lernantoj. Estas elektata ĉiufoje nova ĉefredaktoro.

Je la 15-a de marto la societo aranĝis martan gajan dancvesperon.

S-ano Kiril Draĵev regule parolas en Esperanto ĉiun duan merkredon antaŭ

la mikrofono de Radio Sofia. La prelegoj okazas vespere je 22.55 h. (tempo orienta).

— **Plovdiv.** La ĉiunmerkredaj kunvenoj aranĝataj de la esperantista societo „Kulturo“ en legejo „Antim I“ daŭras. Oni legas artikolojn, rakontojn kaj anekdotojn. Estis elektita speciala komisiono por aranĝo de „Viva gazeto“. Jam aperis kelkaj n-roj.

Alia komisiono estis elektita por eltrovo de malnovaj kaj varbado de novaj samideanoj. Ĝin prezidas s-ano St Kaĉakov. La komisiono organizis plane sian laboron: la urbo estas dividita je kelkaj partoj. Dum la lastaj tagoj oni vizitis multajn malnovajn esperantistojn kiuj reaniĝis al la societo kaj reaboniĝis por „Bulgara esperantisto. Ili kun ĝojo akceptas la inviton helpi al nia societo. La komisiono meritas laŭdon.

La ĵus absolvintaj „novuloj“ de la kurso de s-ano Kamburov jam korespondas. Adreso: Magda Jv. Bataklieva, Gladston 52 — Plovdiv.



Kelkaj membroj de la esperantista grupo en Pazarĝik

— **Varna.** Societo „Albatro“ okazigas regule kunvenojn dufoje en la semajno: merkrede oni aranĝas vivan gazeton kaj vendrede oni lernas esperantajn kantojn. La kunvenoj havas lokon en lernejo „Sulini“. Tri kursoj por komencantoj estas gvidataj de la samideaninoj M. Saraliev, V. Makedonska kaj V. Skolufonova.

Je la 9-a de februaro la esperantistoj kune kun la anoj de la gejunula kooperativa grupo organizis ekskurson al Ĝanavar-tepe. Partoprenis 58 personoj. Posttagmeze estis aranĝita literatur-muzika programo kun riĉa kaj varia enhavo.

Je la 1-a de marto la esp. societo „Albatro“, la gejunula kooperativa grupo kaj la abstinencula societo „Duĥoven podem“ aranĝis kune grandan literaturmuzikan vesperon je memoro de la batalanto por libero de la bulgaroj, Vasil Levski. La vespero, kies programo estis bonege plenumita, havis eksterordinaran sukceson.

Veran plezuron oni sentas, vidante la pionirojn laborantajn sindone kaj senlace por pli da lumo, justeco kaj frateco inter la homoj, en la nunaj malfacilaj cirkonstancoj. La sukceso kuraĝigis la junajn idealistojn de la tri organizaĵoj, ili firme decidis en la estonteco marŝi kune en sia kultur-kleriga agado.

— **Burgas.** En nia urbo estis gasto la vicprezidanto de la C. K. de B. E. S. kaj redaktoro de „Bulgara esperantisto“, prof. d-ro St. Ĝuĝev. Je la nomo de la „Popola Universitato“ en Burgas li faris tri prelegojn 1. Anatomio kaj biologio de la popolkanto; 2. La entuziasmo en la arto kaj en la vivo; 3. Esperanto — tuthomara revo. La tria prelego havis aparte grandan sukceson. La multnombraj ĉeestintoj aŭskultis kun atento la paroladon. La esperantista societo vigle partoprenis la preparon de la kunveno.

— **V. Galiĉe,** Oreĥovsko. Dum januaro la esperantistoj de la vilaĝo faris propagandon por la internacia lingvo. Vespere ni kunvenas en la legejo kaj interparolas pri la deveno de Esperanto kaj pri la vivo de ĝia genia kreinto. Je la 2-a de februaro en la salono de la „Eklezia fratara“ ni malfermis kurson por komencantoj, gvidatan de la pastro. Ĉeestis 19 junuloj, precipe metiistoj, kaj 5 knabinoj. Antaŭ la membroj de la legejo la gvidanto prelegis pri la ideoj de la esperantismo. La vilaĝestro kaj la instruistoj estas favoraj al la iniciativo de la galiĉe'aj esp-istoj.

— **Sadovo.** La 25-an de januaro, s-ano Iv. H. Krestanov parolis je temo „Lingvo kaj vivo“ en la ŝtata agrikultura mezlernejo. Ĉeestis la direktoro, la instruistoj kaj ĉiuj (220) lernantoj. Entuziasmiĝintaj, ĉiuj longe aplaudis la oratoron. La lernantoj esprimis sian grandan deziron por malfermo de kurso kaj fondo de grupo.

Je 29-a de januaro s-ano Krestanov parolis pri la nordaj landoj, kaj je 1-a de februaro — pri la sudaj. Li montris multajn lumbildojn. Ankaŭ tiuj-ĉi du paroladoj okazis en la salono de la agrikultura lerjeno, plej granda en la Balkana duoninsulo.

Panagjuriste La esp-ista societo funkcias regule. Ĝi havas 25 membrojn. Ĉiun mardon kaj vendredon estas aranĝataj kunvenoj por perfektigo en la lingvo. La lokaj aŭtoritatuloj donis bonan ateston kaj ni atendas la konfirmon de la statuto. Kurson gvidas s-ano At. Maĝirov, helpata de s-anino Ana Ĉoĉeva. La intereso al nia afero pligrandiĝas. Ni aĉetis librojn por la societa biblioteko.

Nekrologoj

Kun doloro ni informas la legantojn pri la morto de nia ŝatata samideanino

PENKA ST. DELIĈEVA

el Stara Zagora.

Fervora esperantistino, ŝi senlace laboris por nia ideo, instruante Esperanton. Ŝia animo ripozu en paco.

*

Nia samideano Stefan Ganĉev, membro de la Centra Komitato de la Bulgara Esperanto-Asocio, perdis sian amatan dujaran knabon **Venceslav**. La redakcio esprimas siajn kondolencojn al la nekonsoleblaj gepatroj.

НАБАВЕТЕ СИ ВЕДНАГА

следнитѣ новоизлѣзли книги отѣ
ДИМ. ИВАНОВЪ

ЕСПЕРАНТО-КАРТИНЕНЪ УЧЕБНИКЪ
за самоуци и курсове, бърза метода,
съ речникъ и граматика 96 стр. (II изд.)

20 лева.

ЕСПЕРАНТО-БЪЛГАР. РАЗГОВОРНИКЪ
6 лева.

ЕСПЕРАНТО-БЪЛГАР. РЕЧНИКЪ (II изд.
дание) 400 голѣми стр., който излиза
отъ печатъ къмъ 30. III. 1941 г.

40 лева.

Суми да се превеждатъ по пощ. чеко-
ва с/ка3810 на Дим. Ивановъ — Русе,
ул. „Н. Рилски“ 80. За налож. платежъ
се превежда 8 лв. повече.

Изпитъ за добиване право да се преподава есперанто

Въ „Държавенъ вестникъ“ брой 138 отъ 26. юний 1939 год. е обнародванъ Правилникътъ за прилагане на чл. 4 отъ Наредбата-законъ за измѣнение и допълнение на бюджета на Министерството на народното просвѣщение за 1937 бюджетна година и на измѣнението и допълнението ѝ отъ 28. III. 1939 година. Тукъ даваме нѣкои отъ главнитѣ постановления на тоя правилникъ.

За да се получи специално позволително да се преподаватъ частни уроци на деца до 14 годишна възраст се внася такса 1000 лв., а на по-възрастни — 2000 лв. И за дветѣ възрасти таксата е 2000 лв. Ако лицата се препи-

таватъ отъ частни уроци, внасятъ само 1000 лв.

Такситѣ се внасятъ въ Министерството на народното просвѣщение.

§ 11 отъ Правилника гласи: На лица, които нѣматъ изискванитѣ документи за образование, но иматъ необходимата подготовка и познания по известна специалностъ, позволителни се издаватъ, като бждатъ подложени на провѣрка предъ комисия отъ вещи длъжностни лица при съответни държавни институти, или следъ като тѣхната правоспособностъ бжде удостоверена отъ компетентно държавно учреждение.

Забележка I. Провѣрочнитѣ изпити се произвеждатъ въ началото на м. юний въ гимназии, посочени отъ Министерството на народното просвѣщение и въ академиитѣ презъ време на изпитнитѣ сесии, по програма, изработена отъ самото Министерство.

Само презъ 1939 год. провѣрочнитѣ изпити ще се произведатъ презъ месецъ октомврий.

Забележка II. Лица, които сж преподавали частни уроци по известна специалностъ повече отъ 10 години, се освобождаватъ отъ провѣроченъ изпитъ и се снабдяватъ съ позволително по § 13 на тоя правилникъ. Това се удостоверява съ документи отъ държавно или общинско учреждение.

§ 16. Всѣко позволително се иска съ заявление до Министерството на Народното просвѣщение, отдѣлъ за училищно образование и възпитание — въ което молителятъ опредѣля точно специалността, за която моли да му се разреши да прѣподава уроци, като приложи нужднитѣ документи: свидетелство за образование и за правоспособностъ, кръщелно свидетелство, медицинско свидетелство, свидетелство за сждимостъ, за честностъ и благонадеждностъ, уволнителенъ билетъ или документъ за уредена военна или трудова служба.

Споредъ § 18 на лица, които преподаватъ безъ разрешение, се налага глоба въ троенъ размѣръ, като се събира и самата такса. За нарушението се съставя актъ отъ органъ на Министерството на народното просвѣщение или на данѣчната власть.

Програма за провѣроченъ изпитъ по Есперанто.

А. Писменъ изпитъ.

1. Диктовка на есперанто и преводъ на български езикъ.

2. Диктовка на български езикъ и преводъ на есперанто.

Забележка: Писмениятъ изпитъ трае 4 часа. Текстътъ за есперантската диктовка се взема отъ съчиненията на Д-ръ Л. Л. Заменхофъ, а за българската — отъ съчиненията на български автори.

Б. Устенъ изпитъ.

1. Граматиченъ и стиленъ разборъ на краткъ есперантски текстъ.

2. Въпроси и отговори изъ есперантската граматика.

Забележка. По тѣзи две точки изпитътъ се произвежда на есперанто.

3. История на езика есперанто и неговото практическо приложение и значение.

4. Животъ, творчество и миросгледъ на Д-ръ Л. Л. Заменхофъ; по-важни съчинения на Д-ръ Е. Прива, Ю. Баги и др.

5. История на българското есперантско движение; по-важни български есперантски дейци.

6. Конференция върху основнитѣ въпроси изъ методиката на езиковото обучение изобщо и частно на езика есперанто.

Забележка. По точки 3, 4, 5 и 6 изпитътъ се произвежда на български езикъ. Практически изпитъ-лекция отъ кандидата не се изисква.

Б. Р. Споредъ тази програма презъ м. октомврий 1939 год. се произведе въ III мъжка образцова гимназия въ гр. София, подъ председателството на директора на гимназията, първия официаленъ изпитъ за правоспособностъ да се преподава есперанто. На изпитъ се явиха известнитѣ есперантисти: Зора Младенова—Хансъ и Георги Хр. Димовъ отъ Варна, които получиха свидетелства съ отличенъ успѣхъ. Ако сега има постъпили въ Министерството заявления отъ кандидати, изпитътъ ще се произведе, както повелява Правилникътъ, презъ м. юний, по всѣка вѣроятностъ пакъ въ III м. гимназия.

Книгописъ

1941. *Народно календарче Есперанто*. Подъ редакцията на Ив. Дим. Есперовъ 48 стр. цена 5 лв. Доставка Иванъ Димитровъ, ул. Царъ Борисъ 93. София. Съдържа: „Декларацията на есперантизма,“ Поздравъ отъ д-ръ Иво Лапена, мнения за Есперанто отъ проф. д-ръ Ст. Младеновъ, проф. д-ръ Фаденхехтъ, Тристанъ Бернаръ, Анри Барбюсъ, Селма Лагерльофъ, Тодоръ Павловъ, Георги Бакаловъ, статии отъ

Ив. Д. Есперовъ, Вили Розевъ, Т. Самодумовъ и др.

Dr Ljubomir Živković, Nauka o postanku čovjeka. изд. Hrvatska naklada, Zagreb, 1940., 276 стр. цена 30 динара. Съ кратъкъ речникъ на нѣкои чужди научни термини и едно резюме на Есперанто.

Scienco pri l' ekesto de la homo. Enkonduko en la sociologio. Eld. „Hrvatska naklada“, Zagreb, 1940. Kun mallonga scienca terminaro kaj „Resumo en internacia lingvo Esperanto“.

DEZIRAS KORESPONDI

● S-ino Vera Cserneki, sekretariino de Hungarlanda esperanto-societo; IX, Budapest külső mester-u.

● S-ro Šimon Csóra Ceh-Instruisto de esperanto: Budapest VIII Maria-utca 23. I. 12.

● S-ro Manksinszky Ladislao, studento, Budapest IX, Högyes Endre-u 8. I. 23.

● S-ro Ladislao Halka, (tekotildrond komercisto), Budapest VII Thököly ut. 8. V. 9.

● S-ro Stefan Barta pentroartista, Budapest XI, Krusper-u 3.

● S-ino Maria Kleinberger, kasistino magazine „Corvin“ Budapesto.

● F-ino Anna Yrjänärnen, Kelenhcgyi ut. 20 Finlanda legacio, Budapest.

● S-ro Emeriko Bodor Vac, Rossnth-u 15.

● S-ro Eugeno Dauesvo, Vaé srent Janos utca 8/a.

● S-ro Julio, Benik, Vaé Dcákvoir, Kis utca 2 S Lam.

● S-ro Ivan Dimitrov, 93, str. Car Boris — Sofia.

● F-ino Elza de Graaf, Korte Marnixkade 9 huis, Amsterdam, Holland.

Повечето български есперантисти сж изучили есперанто по учебника на **АТАНАСЪ Д. АТАНАСОВЪ**

КУРСЪ ПО ЕСПЕРАНТО ЗА БЪЛГАРИ

Осемъ издания до сега. Разпространенъ въ 40,000 екземпляра. Цена 20 лева.

Поръчки до: Ат. Д. Атанасовъ, София, Гладстонъ 48. Пош. чекова смѣтка 4343. Отъ сжщия може да се поръча и **Двойния речникъ на есперанто** (есперанто-български и българо-есперантски) отъ Ив. Х. Кръстановъ по намалената цена 60 лева.

„BULGARA ESPERANTISTO“ —

monata organo de la Bulg. Esp. Asocio.
Adreso: 50, str. Alabin, Sofia, Bugarujo.

Poštĉekonto: 1133

JARABONO: Enlande — 20 bulg. levoj. Eksterlande — 4 responduponoj aŭ egalvaloro.

Anoncoi: 1 kv. cm. — 1 levon

RESP. REDAKTORO P. JORDANOV

ПЕЧАТНИЦА „ХУДОЖНИКЪ“ — СОФИЯ — ESPERANTO-PRESEJO „ХУДОЖНИКЪ“ — СОФИЯ-2